

### Aliĝo kaj vizitado ekster la malfermaj horoj kaj aranĝoj

La kalendaron por la misiista salono gvidas

**Paroĥa oficejo de la ev. Komunumo S-ta Petrus en Gerlingen,**

Kirchstraße 42 en 70839 Gerlingen, Germanio

**Tel. +49 (0)7156 9201-0**

rete: [gemeindebuero@ev-petruskirche-gerlingen.de](mailto:gemeindebuero@ev-petruskirche-gerlingen.de)

Demandoj / aliĝoj por privataj vizitoj aŭ la organizado de aranĝoj en la misiista salono bonvolu direkti tien.

La Rebmann-Domo estas **monumentprotektata objekto** kaj pro tio speciala loko.

Vi povas uzi la lokon kaj ĝui, sed validas kelkaj specialaj kondiĉoj, kiujn vi trovos poste en ĉi dokumento.

### Uzantaro

La misiista salono povas esti uzata de **entreprenej aŭ privatuloj** por aranĝoj (ekz. jubileoj, festoj).

Se la kondiĉoj estas plenumataj, principe **ĉiu ajn** estas bonvena.

La misiista salono estas malgranda kaj hejmeca ... vizitanta grupo devus – depende de la uzado – **havi maksimume 12 ĝis 20 personojn**. Por vizitadoj pere de lernejoj klasoj sub gvido de instruisto validas apartaj reguloj, kiujn laŭpete klarigas al vi la paroĥa oficejo de la ev. komunumo S-ta Petrus.

### Kostoj

Vi deponas **kaŭcion** (vidu sube) kaj pagas en la paroĥa oficejo de la ev. komunumo S-ta Petrus:

- 25 Eŭrojn por **provizado kun seĝoj** kaj evtl.
- 20 Eŭrojn por la **uzado de la kuireja ilaro** (Kafovazaro, manĝilaro, akvoboligilo).

### Kaŭcio – aŭ donaco

Por la privata vizitado aŭ eventoj en la misiista salono vi deponas en la paroĥa oficejo de la ev. komunumo S-ta Petrus **kaŭcion**:

- Unuopaj personoj aŭ malgrandaj grupoj ĝis tri personoj 20 Eŭrojn,
- Privatgrupoj ekde 4 personoj dum uzado ĝis tri horoj 50 Eŭrojn,
- Privatgrupoj ekde 4 personoj dum uzado pli ol tri hora aŭ uzado pere de entreprenoj 100 Eŭrojn.

La kaŭcion vi ricevos dum la transdono de la ŝlosilo. Aŭ ...

Vi faros bonan agon: Tuj ĉe la plenigo de la vizitantoformularo vi povas **deklari la kaŭcion kiel donaco** kaj tiel ricevos donacokvitancon.

### Vizitantoformularo kaj transdono de ŝlosiloj

Antaŭkondiĉo por privata vizitado aŭ alia uzado de la misiista salono estas, ke **unu persono estas plenaĝa** kiel petanto aŭ kontaktpersono. Tiu persono devas garanti laŭordan okazon de la privata vizitado / aranĝo.

Antaŭ la transdono de ŝlosiloj pere de la paroĥa oficejo de la ev. komunumo S-ta Petrus la petanto indikas sian adreson sur la **vizitantoformularo** kaj subskribas, ke

- li/ŝi ricevis la ŝlosilon por la misiista salono,
- li/ŝi responsecos por eventualaj damaĝoj en kaj ĉirkaŭ la misiista salono, resp. ĉe tie tenataj aŭ ekspoziciitaj aĵoj kaj pagos por si kaj sia grupo,
- li/ŝi zorgos sekvi la malpermeson fumi,
- li/ŝi kopios sian personan identigilon sur la vizitantoformularon.

La uzantoj devigas sin respekti la karakteron de la domo – speciale la karakteron de la misiista salono. Ĝeni luantojn de la domo aŭ najbarojn estas malpermesata. Post aranĝo purigu la ĉambrojn kaj forlasu ilin maksimume je 22 h.

### Ekipado kaj purigado de la Rebmann-Salono

Dum viaj aranĝoj en la misiista salono grandparte **vi povas mem aranĝi ĉion** laŭ viaj deziroj: La tabloj kaj seĝoj estas libere lokeblaj. Kafovarzon, manĝilaron kaj akvoboligilon bonvolu meti en la malgrandan kuirejon.

Ĉar la misiista salono estas monumentprotektita objekto, muroj, plafonoj kaj mebleroj ne rajtas esti uzataj alie ol intencita, nek esti ŝanĝataj!

Post via aranĝo bonvolu restarigi la komencon staton, tio estas, purigu la uzatajn ĉambrojn kaj eventuale uzatajn erojn de la kuirejo, remetiu la tablojn kaj seĝojn al iliaj lokoj. Koridorojn kaj necesejon pro higienaj kaŭzoj viŝu malseke.

La misiista salono estas kontrolata post ĉiu privata vizitado aŭ aranĝo pere de komisiita persono je eventualaj malpurigo aŭ damaĝoj. Ripararojn / repurigadojn ni fakturos al la subskribinto de la vizitantoformularo.

### Redono de ŝlosiloj

Se via aranĝo finas nur post la **oficejaj horoj de la paroĥa oficejo** de la ev. Komunumo S-ta Petrus en Gerlingen ... nenia problemo: Simple ĵetu la ŝlosilon por la misiista salono en la **leterkeston** de la oficejo. Vian kaŭcion vi povos repreni dum la sekva oficeja tago en la paroĥa oficejo. Aŭ lasu ĝiri la kaŭcion kontraŭ administra kotizo de 5 Eŭroj al via konto – la numeron por tio vi povas indiki jam sur la vizitantoformularo.

### Aparta travivaĵo en aparta etoso

Vi jam legis ... ni estas tre zorgataj pri la konservado de la monumentprotektita misiista salono en la monumentprotektita Rebmann-Domo kaj pro tio starigis kelkajn regulojn. Ni deziras, ke ankoraŭ multaj generacioj de vizitantoj povos ĝui la apartan etoson de aranĝo en la misiista salono.

Dankon pro via subteno en formo de uzado de la misiista salono kaj ĝia flegema traktado.

Via

Johannes-Rebmann-Fondaĵo,

Gerlingen / Germanio